

N. N. 51,
Susuras jen la Hajtabua fjordo

tradukita de Manfred Retzlaff

Susuras jen la Hajtabua fjordo,
Pri la vikingoj kantas kanton ĝi,
Pri ŝipoj alportintaj al ĉi bordo
Valorajn varojn el la sud', eĉ el Persi'!

Aŭdiĝas sonorilo
Sonore tra l' trankvilo.
Surakve fore sonas mevo-kri' –
Ŝlesvigo, salutata estu vi!

*Traduko de la Germana poemo "Es rauscht die Schlei" de N. N. 51 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002-05.*

MR-390-1 / Arg-791-1585 (2013-05-22 20:02:27)